



LA BILETO DE LA PREZIDANTO .

-----

Dans le dernier numéro, j'ai découvert, avec surprise, qu'un de nos amis considérait comme une initiative nouvelle l'invitation à nos membres à exprimer leur opinion tant en ce qui concerne la vie de notre Association que le contenu du présent bulletin.

Souvent, au cours des années passées, nous avons lancés des appels à la participation active de tous : une Association doit être la construction commune permanente de ses membres, et non le fait d'une poignée d'actifs - que l'on compte sur les doigts - soutenus par l'approbation muette de tous les autres - ou censurés par quelques critiques.

Donc sans réticences, écrivez à ceux que vous avez délégués par votre vote, pour coordonner les initiatives, réaliser, dans la mesure du possible, vos vœux, et s'efforcer (mais ils ne le peuvent sans vous) de faire progresser notre action.

Il appartient à ceux qui conseillent et suggèrent d'agir, de prendre leurs responsabilités, d'atteindre dans leur entourage ceux qui sont prêts à montrer quelque sympathie à notre mouvement, puis de les intéresser et de les amener à y participer à leur tour.

Notre préoccupation essentielle doit s'orienter vers la pénétration de notre action dans les milieux que chacun fréquente, et la mise en commun - c'est le but de notre bulletin - des résultats acquis et de la marche suivie pour atteindre nos buts.

R. Cl. COLAS.

XX

-o- LA PARABOLOJ DE JESUO -8-

-----

" Per multaj paraboloj Jesuo parolis al ili la Vorton... ", rakontis Marko (4-33). La ekzegezistoj malkonsentas pri la nombro de tiuj ĉi paraboloj, de 27 ĝis la centò, se oni konsideras kiel parabolojn simplajn komparojn. Kiaj ajn estas la opinioj pri tio, certe laŭ la evangeliuoj, Jesuo prefere uzadis tiun literaturan genron, kiu cetere apartenas al la biblia kaj orienta tradicio. Marko eĉ precizigas : "Sen parabolo li ne parolis al ili; sed private li klarigis ĉion al siaj disĉiploj" (4,34). .../...

La evangeliajn parabolojn kompreni necesas do por ekkapti la mesaĝon de Jesuo kaj samtempe senvualigi la misteron de lia persono.

Mi intensas komentarii kelkajn parabolojn de Jesuo en nia bulteno - kompreneble se la legantoj akordiĝas kun tiu projekto.

Nia celo estus helpi la mediton pri la evangelio. Tiel ni ankaŭ parte plenumus unu el la plej grandaj deziroj de la Dua Vatikana Koncilio ("Dogma Konstitucio pri la Dia Revelacio", i.a.):

"Necesas, ke la tuta eklezia predikado, same kiel la kristana religio mem, estu nutrata kaj regata de la Sankta Skribo" (Nº 21).

"Necesas, ke la Sankta Skribo estu amplekse atingebla de la kristanoj" (Nº- 22) K.t.p.

+  
+ +

Ni inaŭguru tiun serion per tute simpla parabolo entenata en unu paragrafo : la parabolo pri la bona plugisto.

"Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio" (Luko 9,62).

-Unua rimarko : Laŭ la kutimo Jesuo ĉi tie uzas bildon el la ĉiutaga vivo. Liaj aŭskultantoj estas plejparte kamparanoj kaj vilaĝanoj. Kio pli ordinara por ili el la sceno de viro pluganta sian agron ? Jesuo adaptiĝas al sia aŭdantaro kaj al la popola psikologio : li parolas pli bilde ol abstrakte.

-Dua rimarko : Kuntekstleĝo. Por ekkapti la instruon de parabolo ofte necesas remeti ĝin en la rakonto aŭ parabolo en kiu la evangelisto intence enmetis ĝin. Tie ĉi nia parabolo sekvas rakonton pri konkretaj ekzemploj de apostola voko. Ĝi ilustras tion, kion la Sinjoro postulas de siaj disĉiploj, nome tutan kaj tujan pretecon. Kiu volas sekvi Jesuon, tiu devas sin doni senprokraste al la servo de la Diregno, sen prisorgi siajn interesojn. Tia absoluta postulo estas fondita sur malfacilaĵoj de la apostola misio, tial ke oni povas vidi en la sekvanta ĉapitro de Luko (Misio de la 72 disĉiploj elektitaj de Jesuo). Ankaŭ ni memoru, ke multaj disĉiploj forlasos Jesuon. (vidi Johano 6,66-67).

-tria rimarko : Unueco de ambaŭ Testamentoj. Jesuo kaj lia aŭdantaro perfekte konis la Sanktan Skribon (kompreneble la parton, kiun ni nomas Malvona Testamento). Tial la Majstro ofte prenadis siajn bildojn el la biblia literaturo aŭ aludis al epizodoj de la izraela historio. Pri tiu ĉi parabolo, vi devas speciale relegi la belan rakonton pri la vokiĝo de Eliŝa, disĉiplo de Elija (1 Reĝoj 19,19-21). Okulfrapa estas komparo : ni havas antaŭe iel konkretan kaj historian ilustraĵojn de la evangelia parabolo (legu kaj vi mem vidos).

-Kvara rimarko : Ofte interese kaj lumigante estas konsideri la citaĵon aŭ adapton aŭ paralelan tekston de iu dirado de Jesuo en alia peco de la Nova testamento. Tiukaze la parabolo estas propra al Luko (komparu la du paralelajn paragrafojn de Mateo 8,57-62).

Sed ja ŝajnas, ke Paŭlo siaflanke konservis la ideon, se ne la bildon de la bona plugisto, kiam li evokis sian apostolan vokiĝon :

"Forgesante tion, kio estas malantaŭe, li skribis, mi min pelas al la celo, por akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo Jesuo" (Filipianoj 3,13-14).

El la bildo de plugisto Paŭlo pasis al tiu de kuranto. Memkomprenebla estas la adapto, ĉar li skribis al urbanoj, kiuj vizitadis la stadion ludojn, dum Jesuo paroladis al kamparanoj.

+  
+ +

Por ni nuntempe estas klara kaj aktuala la instruo de la parabolo pri la bona plugisto. La disĉiplo de Kristo devas forlasi ĉion por la dia regno kaj senkondiĉe sekvi la Sinjoron (vidu same alian tekston de Luko 14, 26-27). Se al tiu, kiu ne ricevis la proprasence disĉiplinan vokon, la postulo ne estas tiel absoluta, tamen li devas kiel kristano sen kompromiso aparteni al Kristo. Kriston sekvi estas sin lasi ekpreni, transformi, transfiguri kaj kun li antaŭen iri tien, kien li gvidas. Sopirado pri estinteco same kiel kontesto pri kristana Kredo aŭ katolika Eklezio parenigas al tiu "rigardo malantaŭen" de la parabolo.

Ni do estu bonaj plugistoj, "forgesante tion, kio estas malantaŭe", sulkante rekte en la kampo de la Patro post Kristo, kiu estas "la Vojo, la Vero kaj la Vivo" (Johano 14,6)

La VIVIGANTA RIVERO .

=====

Ni legu : (Apok 22, 1-7)

"Kaj li montris al mi la riveron de akvo de vivo, helan kiel kristalo, elirantan el la trono de Dio kaj de la Ŝafido, meze de ĝia strato. Kaj ĉe ĉiu flanko de la rivero estis arbo de vivo, portanta dek du fruktojn, liveranta sian fruktojn, liveranta sian frukton ĉiumonate; kaj la folioj de la arbo estis por la resanigo de la nacioj. Kaj ne plu ekzistos malbeno, kaj en ĝi estos la trono de Dio kaj de la Ŝafido; kaj Liaj servistoj Lin adoros; kaj ili vidos Lian vizaĝon; kaj Lia nomo estos sur ilia frunto. Kaj nokto ne plu ekzistos; kaj ili ne bezonas lumon de lampo, nek lumon de suno; ĉar Dio, la Sinjoro, lumos al ili; kaj ili reĝos por ĉiam kaj eterne.

Kaj li diris al mi : Tiuj vortoj estas fidelaj kaj veraj; kaj la Sinjoro, la Dio de la spiritoj de la profetoj, sendis Sian anĝelon, por montri al Siaj servistoj tion, kio devas okazi baldaŭ. Kaj jen mi rapide venos. Feliĉa estas tiu, kiu observas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro."

+  
+ +

Ni meditu : Kio estas pli bela ol urbo transirita de rivero ? Kio estas pli bela ol tiu akordo inter la naturo kaj la homa laboro ? Viviganta rivero transiras la urbon, kiun Dio konstruas dum nia historio kaj al kiu Li vokas nin por tien laboradi; ĝi tiel baniĝas en sia propra lumo; ĝi enhavas neniam malfeliĉulon. Ĉu mi kredas tion ? Ĉu mi esperas tion, laborante ĉiutage por la homurbo, tiel koncentrita sed tiel malmulte unuigita.

(El Vie Chrétienne N° 131)

XX

VIVO DE LA GRUPOJ .

=====

LES ANDELYS.

Ofte en la entreprenoj, somero signifas malpli da aktiveco; male, en nia esperanto-rondeto, la feriotempo ŝajne donas al ĉiu plian energion. Ĉijare, jam komence de julio, du el niaj junulinoj, Veronika Pannier kaj Lisbeta Schreiber, pasigis tri semajnojn en Gresillon; dume, Silvia kaj Elina Bonnet partoprenis seminarion.



.../...

sinsekvis, escepte piaj votoj .... Tiom longe, kiom la simplaj homoj ne konsentos pri la senegala riĉeco de internacia lingvo por si mem, le tago de Esperanto ne leviĝos. Tiom longe, kiom oni ne faros premon kontraŭ la nevolo, la mutemo aŭ la senzorgo de la ŝtatestraroj, Esperanto ne tagiĝos.

JAHIER Bernard, el Rennes.

=  
=

NDLR.- Nur tre forta landa asocio povas premi la registaron. Se ĉiuj membroj de nia katolika asocio aliĝus al Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), ĝi jam estus pli forta, kaj seĉiu ano poste alportus dek pliajn membrojn al UFE, ni povus ricevi la agnoskon pri publika utilo, kiun ni petas jam de multaj jaroj. Ĉiu el ni ekzameni sian konsciencon kaj vidu ĉu li (ŝi) vere faris sian devon de konscia esperantisto.

xx

LINGVA ANGULO .  
=====

Eble pro la somera libertempo, nur 4 anoj proponis tradukojn : S-roj Despiney, J.M. Guillon, Jahier kaj S-ino Michau.

1)- un prénom : baptonomo (D,G,J,M); antaŭnomo (G,J); voknomo, (M); RDLR : Japanino en Grésillon uzis la esprimon "persana nomo".

ŝajnas, ke ĉi tiu estas pli ĝusta, ĉar komprenebla ankaŭ de nekris-  
tanoj.

2)- faire l'article : laŭdi sian voĉon -(D), rimarkigi la bona-  
ĵojn de vendotaj varoj (G), varlaŭdi, laŭde proponi varojn (J),  
akceli vendadon (M).

3)- faire du porte à porte : domicile proponi sian varon (D),  
vendi varojn vizitante ĉiujn logantojn (G), ĉiudome serĉvendi (J)  
kolporte proponi (M).

4)- avoir vu monts et merveilles : esti vidinta mirigaĵojn kaj  
admitindaĵojn (D), esti laŭdire vidinta admirindaĵojn (G), esti  
vidinta orajn montojn (J), fanfaroni (M).

5- avoir le nez fin : delikate esti sagaca (D), esti tre antaŭzor-  
gema (G), akreantaŭflari, esti akreflari (J), intuicie senti (M).

6)- travailler du chapeau : cerbumegi, ficerbumi (D), Ekfreneziĝi  
(G), cerbumi, cerblabori, ĉapelumi, subĉapele pripensi (J),  
misrezoni, malsaĝe agi (M). .../....

.../...

7)- negocier un virage : senjore ĝiradi (D), mallerte elturniĝi en vojturno (G), eksekvi la ĝiradon (J).

8)- un grain de beauté : belgrajno (D), haŭmakuleto (G), belecgrajno (J), haŭta balmakuleto (J), haŭtbutono (M).

9)- une voix sourde : obtuza voĉo (D,M), mallaŭta voĉo (G), malsonora, mezaŭdebla voĉo (J).

10)- avoir du tact : takte aĝi (D,J), ĝentile konduti (G), esti takta (J), delikate aĝi (M).

11)- un bon petit froid sec : sekeca varmeto (D), malvarmega seka vento (G), akra seka malvarmo (J).

Sinceraĝn gratulon al S-ro Jahier, kiu trovis la plej multajn bonajn tradukojn.

- Novaj proponoj :
- 1)- il est encore vert pour son âge;
  - 2)- j e ne peux plus m'en passer;
  - 3)- fiche-moi la paix;
  - 4)- j'en ai marre;
  - 5)- un beau petit brain de fille.

~~~~~

A N O N C O .

Ĵus aperis tre grava verko "Ce que croyait Teilhard", de Gérard-Henry Baudry, nia simpatia kaj eminenta religia konsilanto. Tiu libro prezentas la ĉefajn liniojn de la kredo travivita de Teilhard, anoncinto de Vatikano II-a.

Aĉetebla en ĉiuj librovendejoj : 15 Fr-

+++++

NIA KONGRESO 72.

Pro neatenditaj malfacilaĵoj, nia LKK ankoraŭ ne povas aperigi precizajn informojn. Bonvolu esti paciencaj.

~~~~~

NOVAJ MEMBROJ : (daŭrigo)

9)- S-ro VALLUET (Loiret)

DUMVIVAJ MEMBROJ : (daŭrigo)

25)- S-ro VALLUET

=====



LA 27-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN EDIMBURG, SKOTLANDO.

-----

Tiu kongreso de la esperantista junularo okazis de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto 1971. Partoprenis ĝin proksimume 160 gejunuloj el 26 landoj.

La temo de tiu kongreso estis : "Junularo kaj kulturo".

Ĉiumatene okazis prelegoj fare de :

- William Auld, la skota esperantista verkisto
- D-ro Wells, anglo
- D-ro H.M. Maitzen, germano
- D-ro H. Eichhorn, orientgermano

Okazis kvar kunsidoj pri la temo; post ĉiu prelego, ni diskutis en grupoj pri niaj diversaj opinioj.

Inaŭguris la kongreson D-ro H. Tonkin, prezidanto de TEJO, lundon, la 9-an de aŭgusto.

Dum la posttagmezoj estis aranĝitaj vizitoj al la urbo (kastelo) skota monumento...) por la komencantoj, kiuj sekvis ĉiumatene Esperanto-kurson, tre bone gvidatan de Francisko Simonnet. Por la aliaj, ĉefe la komitatanoj okazis sericzaj kunsidoj ĉiuposttagmeze. Tiuj kunsidoj estis publikaj (mi partoprenis preskaŭ ĉiujn). Ili estis tre interesaj kaj ofte daŭris de la 14-a ĝis la 18-a, eĉ pli malfrue.

Mardon okazis tuttaga ekskurso por ĉiuj kongresanoj al bela regiono de Skotlando: "Loch Katrine" (Lago Katrine). Vere tre plaĉis al ĉiuj tiu bela regiono !

Ankaŭ en la vesperoj ni havis la eblecon vidi kaj aŭdi belegajn kantojn el Skotlando kaj sakfluton dum la skota vespero.

Vendredon la balon partoprenis la plej multo da gejunuloj.

Sabaton matene, solena fermo kun la nova prezidanto de TEJO, D-ro Renato Corsetti, el Italujo. Ĉiu gvidanto de la diskutgrupoj pri la temo raportis laŭvice pri la plej gravaj punktoj. La honora prezidanto, D-ro H. Tonkin, faris tre kortuŝan kaj bonan paroladon. Oni parolis favore en la lokaj gazetoj pri la 27-a IJK.-

Sabaton posttagmeze, ĉiuj komencis foriri, ĉar la fino de la kongreso estis jam veninta !

